



# NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio  
"La Estonto Estas Nia"*

30-jara; n-ro 9-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

## EUROPA ESPERANTO-KONFERENCO EN VIENO, 1965

La Eŭropa Esperanto-konferenco okazis de la 10-a ĝis la 17-a de julio en Vieno. Ĝin organizis la Aŭstra Esperanto-Federacio kaj la Viena Esperantistaro.

La konferencon partoprenis proks. 350 personoj el almenaŭ 19 landoj (ĉi tiuj ciferoj ne estas oficialaj). Rimarkinda estis la ĉeesto de delegacio de la Soveta Esperantistaro. La partoprenantoj loĝis en studenta hotelo, studenta hejmo kaj aliaj loĝejoj.

La viena konferenco havis karakteron de agrabla, gaja, feria restado en belega urbo kun kelkaj prelegoj kaj fakkunsidoj.

La ĵusalveninton frapis unuavide la amaso de funkciuloj en la konferenco. Ĉiuj portis ŝildeton sur la vesto kaj tiel oni povis tuj vidi, ĉu oni parolas kun komitatano, helpanto, prezidanto aŭ honora prezidanto. Mirakla biologia fenomeno estu menciata ĉi tie: la partoprenantoj estis helpataj ne nur de helpantoj kaj helpantinoj, sed ankaŭ de viraj helpantinoj kaj de virinaj helpantoj, laŭ la ŝildoj kiujn ili portis.

La plej gravaj kunsidoj kaj prelegoj estis, laŭ mia opinio, la inaŭguro, diskuto pri la signifo de Esperanto por Eŭropo, prelego de prof. Lapenna pri „Lingvaj problemoj en la internacia politiko” kaj la fakkunveno de la studentoj.

La diskuton pri „Kulturaj kaj lingvaj problemoj en Eŭropo” partoprenis multaj konferencanoj. Ili konsideris la specialan

urĝon de la lingva problemo en Eŭropo kaj proponis, ke la Esperantistoj agu per specialaj kampanjoj en la Eŭropaj instancoj. Aliaj emfazis la neceson agi inter la junularo kaj en instruistaj medioj kaj unu diskutanto proponis novan agadon inter sciencistoj.

Ĝuinda kaj vere altranga estis koncerto fare de la Brita Esperantisto s-ro Frank Merrick. S-ro Merrick estas profesia pianisto. En sia junaĝo li studis en Vieno. Antaŭ la koncerto li rakontis ĉarme kaj tre sprite pri siaj tiamaj spertoj.

En sia prelego pri „Lingvaj problemoj en la internacia politiko” prof. d-ro Ivo Lapenna skizis la historion de lingvouzado inter ŝtatoj, precipe en la diplomatio. En la periodo antaŭ la unua mondmilito ĉefe la franca lingvo estis uzata de registaroj por traktatoj ks. Post la unua mondmilito la angla aperis kiel interŝtata lingvo. En Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj filiaj organizaĵoj daŭre pli kaj pli da lingvoj estas uzataj por kunsidoj kaj publikigaĵoj.

Kontraste al la opinio de nekonantoj de la problemo la nombro de lingvoj uzataj en la internacia politiko ne malpliigiĝas, sed daŭre kreskas. Ĉiu nacio aŭ grupo de nacioj kun la sama lingvo klopodas pligrandigi sian prestiĝon per akceptigo de sia lingvo kiel oficiala lingvo aŭ laborlingvo. Tamen naciaj lingvoj neniam povas esti internaciaj lingvaj: maksimume ili estas internaciaj helplingvoj. Vere in-

ternacia estas nur unu lingvo per sia strukturo, sia kulturo kaj la konsisto de sia portantaro.

Unu el la plej agrablaj spertoj estis vizito al la Internacia Esperanto-muzeo en la konstruaĵoj de Hofburg. La fondinto s-ro Steiner rakontis al ni kiel li sukcesis akiri ĉambrojn por la Esperanto-muzeo per granda lerto. La kolekto de la muzeo estas treege valora pro la multaj unikaj verkoj kaj Esperantaĵoj, kiuj ne plu ekzistas en aliaj lokoj.

La konferencanoj ekskursis plurfoje. Marde okazis aŭtobusaj ekskursoj al diversaj vidindaĵoj en la proksimeco de Vieno. Jaŭde ĉiuj konferencanoj povis ekskursi al la ruino de Dürnstein. Ilin veturigis ŝipo sur Danubo. Nur vespere ni revenis en Vieno.

La fakkunsido de la studentoj estas mencienda pro la grandega gravo de la studenta movado. Studentoj okupas ŝlosilan pozicion en la universitatoj, kie ili post sia finstudo estos instruistoj aŭ sciencistoj. Ĉiukaze ili okupos gravan lokon en la socio pro sia klereco. Oni diskutis i.a. pri ISSK, kampanjo por interŝanĝo de fakaj informoj inter studentoj- Esperantistoj kaj pri tradukservo por sciencaj artikoloj.

Vieno, la konferencurbo, estas tiom bela kaj vidinda, ke tio fakte ne permesas pervortan priskribon. Al tiuj, kiuj neniam vizitis ĝin, mi volas tamen doni kelkajn impresojn.

Imagu grandegan urbon, kiu estas konstruita laŭ genia plano kaj zorge projektita tiel, ke ĝi estu harmonia kaj ebligu komfortan, trankvilan homan vivon. Parkoj kun belegaj floroj, fontanoj, statuoj, lagetoj kaj ripoziga silento abundas en Vieno. Unu el la konferencanoj diris: „Se oni voĉdonus, kiu urbo estu ĉefurbo de la mondo, mi voĉdonus por Vieno”.

Laŭdon al la aranĝintoj kaj manpremon al tiuj, kun kiuj ni travivis tiun ĉi agrablan tempon.

R. Groeneveld.

## LA POSTKONFERENCA ESKURSO TRA AŬSTRUJO.

Dimanĉe, la 19-an de julio, parto el la Konferencanoj daŭrigis sian restadon en Aŭstrujo per partopreno al la Postkonferenca Ekskurso tra Aŭstrujo per aŭto-

busoj. Forveturis du aŭtobusoj, kiuj pro organize teknikaj kialoj veturis la saman vojon, sed en kontraŭaj direktoj.

En la aŭtobuso, en kiu estis multaj el la anoj de la nederlanda komuna vojaĝgrupo, troviĝas 35 personoj, apartenantaj al 11 nacioj.

La vojo, kiun ni iris, kondukis tra plej bela regiono de Aŭstrujo. Ni trairis Graz. Klagenfurt, Grossglockner, Saalbach ĉe la Lago de Zell, Hallein, Salzburg, Linz, Vieno.

Dumvoje ni vitis amason da rigardindaĵoj, unu eĉ pli brila ol aliaj.

Dum la veturo okazis dufoje, ke ni restis dum du noktoj en unu sama tranoktejo. Tio okazis en Klagenfurt, en la apudeco de la lago de Wörth, kaj en Piesendorf en la apudeco de la lago de Zell.

En ambaŭ tagoj estis bonega ebleco dum iom da tempo bani en la lagoj. En la ceteraj partoj de tiuj tagoj ni faris mallongajn ekskursojn, i.a. al la elektrogenerejoj Kaprun, al la Liechtensteinklamm kaj al la salminejo en Hallein. Ĉiu el ili estis evento tute aparta per si mem.

En Salzburg, kie ni alvenis sabatomatene, ni estis akceptataj de du Salzburg-aj esperantistoj, kiuj tre fervore montris al ni tiom da belaĵoj de la urbo, kiom nur estis eble dum la malmulthora restado en tiu urbo. Poste ni veturis al Linz, kie ni havis la eblon, admiri la novan, moderne aspektan Esperanto-monumenton. En la vespero de tiu tago ni alvenis je proksimume la 20-a horo denove ĉe nia hotelo en Vieno. Ĉiuj centprocente kontentaj kaj pri tio kion ni spertis dum la tutsemajna ekskurso, kaj pri la brila gvidado de s-ro Ing. Helmut Illetschko, kaj pri la bonega, sendanĝera veturigado fare de la aŭstra ŝoforo.

La postan tagon, dimanĉon, ĉiuj uzis por ankoraŭ unu fojon ekskursi en la baldaŭ adiaŭota Vieno.

Vespere, je la 23.10-a horo, ĉiuj okupis siajn lokojn en la vagonaro al Nederlando. Post glate sukcesinta vojaĝo ni atingis Utrecht-on, la finhaltejon de nia Komuna Vojaĝo.

Ĉar diversaj personoj el nia grupo daŭrigis sian vojaĝon en la direkto al Amsterdam, la reciproka adiaŭado jam okazis en la vagonaro dum la veturado. Aŭ, efektive ne okazis „adiaŭado”, sed sincera „ĝis revidado”, kio estis la plej bona pruvo pri la kontenteco de ĉiuj!

J. Th. de Goeij.

## LA KOMENCIĜO DE LA NOVA SEZONO 1965-1966.

Ĉiun jaron je la komenciĝo de nova laborsezono en ĉiuj gazetoj, organoj kaj kluboj oni povas legi kaj aŭdi instigajn vortojn kiel freŝan energion, kuraĝon, novan aktivecon, kunlaboron, propagandon, aktivan partoprenadon en la klubvesperoj, ktp.

En klubo en Pollando mi vidis alian manieron por instigi. Ĉi tiun fojon mi volas sciigi al la membroj okaze de la komenciĝo de la nova laborsezono tiujn instigojn.

### Kiel pereigi vian asocion:

1. Ne venu al la kunvenoj, aŭ se jes, venu malfrue.
2. Se la vetero ne plaĉas al vi, ne forlasu la hejmon.
3. Se vi ĉeestas, plendu pri la laboro de la estraro.
4. Neniam akceptu oficon ĉar estas pli facile kritiki ol labori.
5. Tamen grumbli se oni elektos vin al iu komisiono aŭ komitato.
6. Se la prezidanto petas vian opinion, diru ke vi havas nenion por diri.
7. Ne faru pli ol estas absolute necese; sed kiam aliaj forte laboras kaj sin donas al la aferoj, kriacu ke la organizaĵo estas kontrolata de „kompetentuloj”.
8. Ne ĝenu vin pri la varbado de novaj membroj. Lasu tion al via sekretario aŭ najbaro.
9. Se oni petas vian kotizon, ne pagu ĝin, aŭ almenaŭ prokrastu la pagon kiom eble plej longe.
10. Estu avida trovi ion malbona kaj trovinte ĝin, eksiĝu.

Dankon por via atento kaj lernu parkere!

H. Kervers.

## ASOCIAJ INFORMOJ.

### NIA JUBILEA KONGRESO.

Lasta memorigo pri nia Jubilea Kongreso de 24-26 septembro en „Internationale School voor Wijsbegeerte”, Dodeweg 8, Amersfoort.

Okazos malgranda ŝanĝo en la programo: la temo de la prelego de prof. Hamming ne estos „Ĉu la estonto estas nia”, sed „La vojo al la venko”.

Por la programo oni vidu la junian numeron de „Nederlanda Esperantisto”.

### MABESOONE-FONDAĴO.

La enspezoj dum la unua duono de 1965 estas jene:

29/12-1964 D.K. en G.	f 2,50
22/1 -1965 J.P.H. en H.	f 5,—
11/3 -1965 Dr. W. A. V. v. T.	f 15,—
12/3 -1965 Sekcio Den Helder	f 40,—
24/3 -1965 Sekcio Arnhem	f 10,25
15/4 -1965 Sekcio Amersfoort	f 20,—
24/6 -1965 L.B.-Schr. en I.	f 15,—

Entute f 107,75

La donacoj pli malavare envenas ol en la pasinta jaro, do koregan dankon al la donacintoj: Sekvu la bonan ekzemplon.

J. E. Prins,  
Hora Siccamasangel 294,  
Groningen.  
Poŝtĝirkonto: 81 58 89.

### „Esperanto”-telefonnumeroj.

En „N.E.” de septembro 1964-a s-ro H. Bakker Sr. el Amsterdam atentigis pri la ebleco por kelkaj guldenoj presigi en la telefonlibro apartan mension de telefonnumero ekz. sub „Esperanto-Voorlichtingsdienst”, aŭ iu alia teksto komenciĝanta per Esperanto.

Ni nun povas sciigi, ke laŭ nia scio almenaŭ por la sekvantaj lokoj en nia lando ekzistas tia „Esperanto-numero”:

Alkmaar, Amersfoort, Amsterdam, Arnhem, Groningen, Den Haag, Haarlem, Hilversum, Leeuwarden, Leiden, Nijmegen, Rotterdam, Velp (Gld.), Zaandam. Eble tio ĉi estas instigo por Esperantistoj en aliaj urboj kaj vilaĝoj fari same.

### KORESPONDPETOJ.

Tri japanaj studentoj deziras korespondi: S-ro Takahaŝi Kajuca (20-jara) interŝ. pm., alumetikedojn kaj originalajn artaĵetojn. Adr.: c/o Iuui Sataro, 4, Kita 2-banĉo, SENDAI (Mijagi), Japanujo.

S-ro Katajose Teruo (18-jara) interŝ. pm. Adr.: c/o Juhorjo, 60, Kanomae, Nagamaĉi, SENDAI (Mijagi), Japanujo.

S-ro Hosoj Ŝozo (20-jara) interŝ. pentraĵojn de infanoj kaj semojn de floroj. Adr.: c/o Ono Micuko, 35-9, Ipponsugi-Kita, Aramaki, SENDAI (Mijagi), Japanujo.

## EL LA SEKCIOJ.

### Sekcio Arnhem.

Sekr.: Pontanuslaan 7.

Por fini la sezonon la sekcio Arnhem organizis je sabato, la 26-a de junio, eksterurban tagon en Doorn. Ĉirkaŭ 30 personoj, membroj kaj ne-membroj de L.E.E.N., el diversaj lokoj de nia lando kaj eĉ el la eksterlando, i.a. el Skotlando kaj Jugoslavio, vizitis tiun ĉi ekskurson. Post la vizito al la kastelo de la iama germana imperiestro oni kunvenis en Hotelo Pabst, kie la partoprenantoj povis ĝui tre interesan prelegon, ilustritan de kolordiapositivaj, de d-ro K. L. de Bruin el Enschede, kiu rakontis pri sia turisma vojaĝo al Moskvo kaj Leningrado.

Per sia kono de Esperanto li tie povis rekte kontakti kun Rusoj.

La sekcio Arnhem povas varme rekomendi d-don De Bruin kiel prelegonton por aliaj sekcioj.

### Sekcio Hago.

Sekr.: Van Trigtstraat 20, Den Haag.

Kore ni gratulas ĉiujn, kiuj sukcesis en la ekzamenoj, kaj precipe la anojn de nia propra sekcio, nome:

*Elementa diplomo:*

s-ino J. C. Heetkamp-Sentius  
s-ro J. C. de Kat  
s-ro P. M. van der Lem

*Meza diplomo:*

s-ino M. de Kunéry-Malinics  
s-ro A. Bloemhard

*Supera diplomo:*

f-ino W. B. P. Blomme  
s-ino G. W. Hooyer

La 30-an de junio ni havis festan klub-vesperon, ne nur pro ĝojo pri la sukcesintoj en la ekzamenoj, sed ankaŭ pro la ĉeesto de multaj gajaj infanoj, nome la gelernantoj de s-ino Carli kun iliaj gepatroj.

Post komuna kantado de „La Espero” sekvis diversaj infankantoj kaj eĉ kelkaj de la infanoj mem faritaj teatraĵetoj.

Kiel klare kaj kuraĝe ili jam parolas!

Kompreneble s-ro Kervers kaptis la okazon propagandi Esperanton por la gepatroj, kiuj jam nun ne plu komprenas la vortojn de siaj infanoj, do ili nepre anoncu sin por la nova kurso post la ferioj!

Sonbende ni aŭdis ĉarman interparoleton en Esperanto de Inge Koning kun ŝia patrino.

Pro la gravaj lernejoj ripettaskoj la gelernantoj de s-ro Bloemhard ne povis ĉeesti, sed ni intencas ilin inviti post la liber-tempo.

### Sekcio Hilversum.

Sekr.: Jonkerweg 11.

La 12-an de junio LEEN-anoj el diversaj urboj renkontiĝis en Hilversum. Kvantam la vetero ne estis tre bona, ni promenis matene. Post la lunĉo Mag. S. Pragan prelegis pri sia patrujo Rumanujo kaj rakontis multajn interesajn aferojn pri tiu lando, kiun ni nur tre malmulte konas. Intertempe li ankaŭ aŭdigis rumanan popolmuzikon. Bedaŭrinde la filmoj ne povis esti montrataj kaj same bedaŭrinde ĉeestis malpli da personoj ol ni atendis.

Tamen la ĉeestintoj povas rememori agrablan kuneston en amika sfero.

### Anoncoj

J. D. Brakel transloĝiĝis al Adriaan Kluitstraat 34, Rotterdam-12.

Pola adoranto de la nederlanda poeto kaj socia aganto **Frederik van Eeden** serĉas urĝe liajn sociajn verkojn, nun tute elĉerpitajn, por siaj sociaj studoj (Prunte aŭ antikvaje). Adreso: Jan Zawada, Warszawa 21, ul. Pruszkowska 6.m.48. Pollando. Povas ankaŭ interŝanĝi kontraŭ polandaj valoraj esperantaĵoj.

### SKRIBA KURSO POR LA E-DIPLOMO

en kunlaboro kun la

#### Leidse Onderwijs Instellingen

Informoj kaj aliĝoj nur pere de nia sekretariino:

S-ino W. P. Lok-van Putten,  
Brederodelaan 36,  
Santpoort (Z.),  
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

## S. S. DE JONG Dzn. †

Je la 20-a de julio forpasis, 61-jara, en la malsanulejo de la frisa urbeto Sneek, kie li estis flegata dum kelkaj monatoj, s-ro S. S. de Jong D-filo, loĝinta en Tjerkwerd, naskiĝinta je la 14-a de decembro 1903-a en Berlikum, ambaŭ frisaj vilaĝoj. Sibe Sipke de Jong estis, malgraŭ la paralizo, kiu trafis lin je 18-jara aĝo, kiu signifis gravan malhelpon dum lia tuta vivo, kiu ligis lin plej multajn horojn tage, kaj la lastajn jarojn daŭre al la lito, province, sed ankaŭ nacie kaj internacie konata figuro, precipe sur la tereno de Esperanto kaj la frisa lingvo. Li estis Esperanto-profesoro, kompilinto kaj prizorganto de skriba Esperanto-kurso, delegito de UEA, gvidanto de la Esperanto-Radioservo, kunlaboranto kaj korektanto de „Nederlanda Esperantisto” kaj gvidanto de Esperanto-kurso en „Het Trefpunt” de la Nederlanda Ruĝa Kruco.

En kunlaboro kun W. Veenstra li verkis „Ponto al la Praktiko”.

Li estis ne nur la tradukinto de diversaj rakontoj el la libro „Frisaj Rakontoj en Esperanto”, sed ankaŭ la kolektinto, finredaktoro kaj enkondukinto. Ĉi tiu rakontaro aperis pasintjare kiel eldono de la Frisa Akademio, sub aŭspicioj de UEA, ĉe Laverman en Drachten (Frislando, Nederlando) kaj ĉie en la mondo ĝi estas favore prijuĝita. Kaj jam s-ro De Jong ricevis honorigan taskon de la estraro de la Frisa Akademio.

Artikolaron pri la dumvilita rezisto aperintan en loka ĵurnalo en Leeuwarden, li tradukis en la frisan lingvon, same laŭ peto de la Frisa Akademio. Ĝi aperis en frisa lingvo libroforma kaj li intencis traduki tiun ĉi frisan libron ankaŭ en Esperanton.

Por pluraj Esperanto-kongresoj li tradukis la tekstojn de frisaj kantoj Esperanten sed li ankaŭ mem faris poemojn kaj melodiojn. I.a. li komponis la Roboto-maŝinon por la kruizoj de Ruĝa Kruco por malsanuloj kaj invalidoj, kiujn ŝipveturojn li gajigis per akordeonmuziko kaj kantigado.

En la jaroj '30 li organizis kiel gvidanto de la Frisa Esperanto-Instituto en Huisum apud Leeuwarden diversajn Esperanto kursojn en la provinco, por kiuj li altiris eksterlandajn geprofesorojn. Ankaŭ pro tio Frislando ricevis en la mondo la nomon „la verda provinco”.

Li prizorgis sukcese plurajn kursojn pri la frisa lingvo kaj donis anglajn lecionojn al elmigrontoj. Plue li donis muziklecionojn por diversaj instrumentoj. Li cetere estis kunlaboranto de pluraj frisaj ĵurnaloj. En la vilaĝo Tjerkwerd li liveris por multaj geedziĝaj kaj aliaj festoj poemojn kaj kantojn.

En la domo Waltawei n-ro 3 en Tjerkwerd, kie zorge flegis lin kuzino, f-ino Sietske de Jong, frekvente vizitis lin liaj geamikoj. Ili venis ne nur el la ĉirkaŭaĵo, sed el ĉiuj mondpartoj kaj preskaŭ el ĉiuj landoj de Eŭropo. Kaj ĉiuj poeme aŭ proze skribis kelkajn liniojn en lia „Ora Libro”. Lia korespondado estis senmezura.

La Esperanto-mondo perdas pro lia forpaso grandan mondĉivitanon, la provinco Frislando unu el ties plej fidelaj filoj, la geamika rondo gajan, helpopretan amikon. Dum sia tuta vivo li pravigis la tezon, ke fortega spirito venkas eĉ la plej malfortan korpon.

La kremacian solenaĵon je la 23-a de julio en Westerveld ĉeestis krom la parencoj grandega aro da geamikoj el la tuta lando kaj eĉ el la eksterlando.

Adiaŭis s-ro H. Kervers el Hago por „L.E.E.N.”, s-ino E. Kervers-van Tholen por U.E.A., kaj f-ino W. Steffering por Frisa Esperantista Rondo. Ili parolis emocie vortojn de danko kaj admiro kaj nomis Sibe de Jong, la korpe tiom ĝenatan, sed spirite tiom elstaran homon, ekzemplo de kuraĝo kaj laborforto, viro neforgesebla.

W. Steffering.

Dum la kremacisolenaĵo la prezidanto de L.E.E.N., s-ro Kervers parolis la sekvantajn vortojn:

Kara Sibe,

Kiel prezidanto de via Esperanto-asocio „La Estonto Estas Nia” mi estas certa, ke mi nun parolas el la nomo de ĉiuj membroj de nia asocio. Sed ne nur el la nomo de L.E.E.N. membroj, sed ankaŭ el la nomo de tre multaj Esperantistoj en kaj ekster Nederlando mi certe nun parolas, ĉar per kaj pro via senĉesa granda aktiveco por Esperanto vi akiris multajn bonajn amikojn en la tuta mondo.

Mi havas la certan konvinkon ke ĉie en la mondo je la momento kiam oni ricevas la malĝojigan sciigon de via morto, oni pensas al vi kun granda ĉagreno en la koro.

Multaj validoj kaj multaj malpli validoj estas dankemaj pro via helpo, kiun vi malgraŭ via propra korpa malhelpo- kapablis doni al ili dum via vivo.

Estas tre feliĉe, ke vi ankoraŭ mem vidis la eldonon de via traduko „Frisaj Rakontoj”.

Por ni ĉiuj vi restos luma ekzemplo en la estonteco kaj ni ŝuldas al vi konstante daŭrigi nian senĉesan laboron por la disvastigado de la internacia lingvo Esperanto kiel unu el la plej gravaj rimedoj por pli bona kontakto rekta kaj interkompreniĝo inter la homoj. Tian interkompreniĝon vi mem tiel bone montris al ni.

Frislando perdis veran frislandan filon kaj Esperantujo perdis meritplenan Esperantiston.

La Esperantistoj treege bedaŭras ke ili jam nun devas adiaŭi vin por la plej lasta fojo.

Ili deziras ke vi nun havu la eternan pacon.

### Jen sekvas la vortoj, kiujn parolis f-ino Steffering, prezidantino de Frisa Esperantista Rondo:

*Estimata familio, geamikoj, gesinjoroj,*

Sibe, nia granda amiko, ne plu estos en nia mezo kaj tio estas io ne-kredebla.

Por ni de la Frisa Esperantista Rondo, de kiu li estis fidela kaj energia ano, kaj precipe por ni de ties estraro, li estis konsilanto. Li, korpe senhelpa, ligita al la lito, estis spirite la fortulo, la stimulantulo, la inventema, inteligenta laboreganto, sed ankaŭ la laŭmense ludema, afabla kaj gaja Sibe. Li, kiu en la litera senco de la vorto ne povis fari unu paŝon, ofte kiel la unua ekmarŝis, se temis pri nova entreprenado. Kvereli estis io de li ne konata. De ĉiu li vidis la plej bonajn ecojn kaj oni do neniam iris al li por plendi pri aliaj. Ĉiu kverelo, ĉiu interhoma malakordiĝo estis vid-al-vide kun ĉi tiu homo tiom negrava, ke ĝi ne validis la diskutadon. La rigardo de Sibe vagadis pli foren, trans la limojn inter homoj, grupoj aŭ popoloj. Fontis el lia karaktero lia Esperantisteco. Li havis kontaktojn kun homoj de preskaŭ ĉiu nacieco kaj de diversaj rasoj; li neniam distingis inter personoj. Li estis samtempe servanto kaj gvidanto kaj tio estas la plej alta ŝtupo, kiun homo povas atingi. Sibe servis en malgrandaj kaj grandaj rondoj: en la vilaĝo, en la

### PENTEKOSTA KONFERENCO DE NEDERLANDA ESPERANTA JUNULARO.

TRE SUKCESA FESTO -GRAVA PRUVO PRI LA VIVKAPABLO DE NEJ.

Ĉi tiu unua konferenco, aranĝita de NEJ (Amsterdam 5-8 junio 1965) estis la unua manifestiĝo de la vivo de NEJ kaj ĝia sukceso alportas blovon de freŝa kaj abunda espero al nia estonta agado.

En la konferenco estis du gravaj eroj: programeroj kaj manĝoj. Sabate posttagmeze oni alvenis kaj poste „daŭre regaliĝis”. Vespere farso „Varbklopodoj por NEJ” estis prezentata.

Dimanĉe ni havis belartan festivalon: kantado kaj pentrado de abstraktaj pentraĵoj. Ni jam malakceptis multajn ofertojn de famaj muzeoj pri la pentraĵoj.

S-ro R. Kwantes montris al ni tre interesajn filmojn. Vespere li montris belegajn diapozitivajn. Ĉi tiuj filmoj kaj diapozitivaj kun neimageble belaj koloroj ne permesas pervortan priskribon. Ni povas diri, ke s-ro Kwantes sukcesigis nian konferencon per siaj filmoj kaj diapozitivaj. Lundo estis festotago. Okazis festpromenado, festmanĝo, festparolado kaj festotrinkaĵo. La menuo de la festmanĝo, kiu estis preskaŭ la plej altranga programero de la konferenco, elpensis kaj efektivigis f-ino Manjo de Jong.

Ĉion ĉi havis la partoprenantoj je ridinde malalta kotizo.

Frisa Esperantista Rondo, en la Nederlanda Esperantista Asocio „L.E.E.N.” kaj en la Universala Esperanto Asocio. Kaj li servis multajn Esperantistojn ankaŭ ekster tiuj ligoj. Li servis la stelon de sia idealo, eĉ pli: li mem estis stelo kaj ni povas esti ege feliĉaj pro tio, ke lia lumo tiom longe gvidis nin. Li estis granda homo, granda amiko, granda filo de Dro. Zamenhof. Lia vivstelo estingiĝis, sed ĝi postlasas brilon, kiu ebligas nin vidi ankoraŭ multon. Ni vidas klare nian vojon.

„Sibe, wy sille fierder arbeidzje mei ús krêft, yn Jou geast”.

(Estas frislingvaj vortoj, signifantaj: Sibe, ni pluen laboros, per nia forto, laŭ via spirita indiko). Ni dankas vin, kara amiko kaj samideano.

Via ekzemplo validas por ĉiam!

Krome oni repagis parte la vojaĝkostojn. NEJ daŭre aranĝos tiajn altrangajn aranĝojn. Ni bezonas ĉies subtenon, precipe de gejunuloj, kiuj tre multe profitas kaj ĝuas per NEJ. Tion abunde kaj laŭ plej klara maniero pruvis la Pentekosta Konferenco de NEJ.

Roberto Groeneveld.

### Jubileo Andreo Cseh

Je la 12-a de septembro Andreo Cseh, eltrovinto de la Csehmetodo, fariĝos 70-jara. Samtempe estos la datreveno, ke li antaŭ 35 jaroj fondis la „Internacian Cseh-Instituton de Esperanto”.

Por reliefigi ambaŭ jubileojn ni mallonge skizas sube la vivon de s-ro Cseh, la Cseh-metodon kaj la laboron de la Instituto.

Andreo Cseh (prononcu: Ĉe) naskiĝis 12 septembro 1895 en Marosludas (Ludoŝulde-Muruŝ) en Romanujo. Kiel katolika pastro li agadis dum mallonga tempo en kelkaj urboj.

Ekkoninte Esperanton li jam baldaŭ komencis instrui la lingvon. En 1920 en Sibiu (Hermannstadt, Nagyszeben) li volis doni kurson al diverslingva publiko. Por tute eviti la uzon de nacia lingvo, li ellaboris specialan rektan instrumentodon, dum kiu de la komenco nur Esperanto estas parolata. Ĉefa karakterizilo de la metodo estas senigo de lernolibroj. Estas akcentinde, ke la lernantoj laŭ tiu ĉi metodo tre baldaŭ ekparolas en la internacia lingvo.

En la unua tempo la aŭtoro aplikis sian metodon ĉefe en Rumanujo, sed ricevinte de sia episkopo la permeson tute dediĉi sin al Esperanto, li komencis en 1928 serion de kursoj en Svedujo, kiuj multe helpis al plifortigo de la movado.

En 1929 Andreo Cseh venis al Nederlando kaj donis tie kelkajn sukcesplenajn kursojn. Por doni pli firman bazon al la organizo de Cseh-metodaj kursoj kaj por eduki instruistojn Cseh fondis kune kun s-ino Isbrücker je 24 majo 1930 en Hago la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto.

La instituto eldonis diversajn helpilojn por la instruantoj kaj organizis de 1930 ĉiujare en Arnhem internaciajn kursojn kaj seminariojn por instruistoj. La urba estraro de Arnhem kun urbestro Mag. De Monchy estis tiel favore impresita de la laboro de la instituto, ke ĝi disponigis senpage al la instituto grandan domon

Presikhaaf en bela parko por fari el ĝi hejmon por kunvenoj de Esperantistoj, por internaciaj konferencoj kaj por Cseh-metodaj kursoj. En la dua mondmilito la Esperanto-Domo estis likvidita, same kiel la Instituto. La germanaj okupantoj ja rigardis Esperanton, same kiel „pacifismon kaj humanismon kiel la plej grandajn krimojn kontraŭ la vivo de la popolo”.(!)

Post la milito la Instituto restariĝis, tamen ne la Domo. De la komenco de 1932 la Instituto eldonis ilustritan ĉiunomonatan gazeton „La Praktiko” por la nove edukitaj Esperantistoj. La revuo nun estas eldonata de UEA.

La jarkunveno de L.E.E.N. en 1960 nomis Andreon Cseh honora membro de la asocio, tiel agnoskante liajn meritojn por la Esperanto-movado.

H. G.

Vidu:

Andreo Cseh: Dum la uragano. La sorto de la Praktiko, de la Internacia Esperanto-Instituto kaj de la Esperanto-Domo en Arnhem dum la milito. La Praktiko 1946, p. 15-16.

Ir. J. R. G. Isbrücker, Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado, 3-a eld., 1938, p. 39-40.

I. Ŝisjaev, L. Kókény kaj V. Bleier, Enciklopedio de Esperanto, Vol. I, Budapeŝto 1933-1934, p. 87/88a.

### LA 50-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN TOKIO

31 julio—7 aŭgusto 1965.

De la bonege funkcia gazetarŝerpo ni jam ricevis diversajn ampleksajn raportojn pri la kongreso.

Antaŭ la inaŭguro i.a. okazis intervjuo kun la prezidanto de Japana Unesko-Komisiono.

Malfermita estis la kongreso de s-ro H. W. Holmes, honora prezidanto de UEA. La festparolado estis de d-ro Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario de TEJO.

Aparte menciinda estas la Japana Vesperejo je la 1-a de aŭgusto.

Je la 7-a de aŭgusto okazis la ferma soleo. Al s-ro U. Thant, ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, estis sendata rezolucio, en kiu esprimiĝis la apogo de la kongresintoj al la laboro por la Jaro de Internacia Kunlaboro.

En la oktobra numero de „N.E.” ni espereble povos publikigi pli detalan raporton pri la Tokia kongreso.

## TRA LA LIBRARO.

*ESPERANTO - MODERNA LINGVO, studo baze de la Fundamento, de Akademia triopo Setälä, Vilborg, Stop-Bowitz. Eldonis: Fondumo Esperanto, Helsinki. Broŝuro 136 paĝa, 10 x 17,3 cm., rotoprinta preso laŭ fote malgrandigita skribmaŝina teksto. Prezo: gld. 3,75.*

Nova libreto pri jam malnova temo: ata/ita, streĉe interesa kaj riĉe dokumentita enhavo, kvankam kun tro modesta aspekto.

La nomoj de la tri aŭtoroj kaj de la verkinto de antaŭparolo, prof. Collinson, jam garantias nepre objektivan pritrakton de tiu ĉi tiom tikla temo. Eĉ ne unu vorton en la verketo atistoj aŭ itistoj povas konsideri iel ofenda; jam per tiu fakto la eldonaĵo staras sur multe pli alta nivelo ol la jam konata „Simpozio”.

Ĉiu el la tri aŭtoroj traktis la temon laŭ sia maniero. Stop-Bowitz dediĉis specialan atenton al la diferenca evoluo de antikvaj kaj modernaj hind-eŭropaj lingvoj, al la sencoj de tempoj kaj aspektoj, kiuj ludas ĉe ambaŭ grupoj neegalajn rolojn. El tio estiĝis la nun regantaj nocioj koncerne tempojn kaj aspektojn de la verbo. La kerno de la demando do estas: la du grupoj, pli-malpli influataj de siaj naciaj lingvoj, ne atribuas al la verbo precize la saman enhavon. Ĉe esperantistoj rezultiĝis el tio inter si kontraŭaj opinioj, en kiuj ambaŭ partioj laŭ siaj vidpunktoj iel pravas, ĉar iliaj konceptoj baziĝas sur profundaj konvinkoj. Ne estas do mirige ke la du grupoj ne komprenas la argumentojn de la alia. Per si mem tio ne tre gravas; gravas nur la danĝera fenomeno ke itistoj kondamnas ĉiujn formojn kiuj ne plene akordiĝis kun ilia propra opinio.

Speciale laŭdinde en la verketo estas, ke ni ne rekte povas konsideri ĝin kiel defendon de atismo, eĉ malpli kiel atakon al itismo, sed pli ĝuste kiel sciencon pritrakton de ŝajne inter si kontraŭaj Zamenhofaj teorio kaj uzado, por fine veni al la konkludo ke lia sistemo pli bone harmonias kun la cetera strukturo de Esperanto kiel moderna lingvo.

Ĉe la fino Stop-Bowitz aludas rimedon por mildigi la efikon de la ekzisto de du sistemoj: uzadon de oni kun aktivo. Jen la rimedo kiun ni jam kelkfoje rekomendis. Germanoj tro ofte uzas pasivon en

kazoj kie oni prefere uzu aktivan.

„Se tia studaĵo estus aperinta antaŭ dek jaroj, Waringhien ne estus gajninta tiom da tereno”, skribis al mi amiko-kompetentulo. Lian opinion mi plene subskribas. Tamen, ankoraŭ nun ĝi prezentas tre valoran materialon: ĉar ĝia karaktero de rezonado estas supra kaj neniel altruda, ĝi povas ankoraŭ multe kontribui, se ne al plena interkompreno, almenaŭ al tolerema sintenado kontraŭ la alia partio. Por interesiĝantoj ĝi estas nepre havinda studaĵo. Ĝia sola bedaŭrinda flanko estas la tro malgrandlitera preso, kiu lacigas la okulojn de la leganto.

G. J. D.

*SUR LA VIVOVOJO, poemaro originala kaj tradukita de Aleksandro Logvin. Prezento de F. Szilágyi. Kovrilo de Jan Schaap Jr. Eldonis STAFETO J. Régulo, La Laguno, Kanariaj Insuloj. Formato 12 x 18½ cm., broŝurita, 115 paĝoj. Prezo f 4,40. Mendebla ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.*

Aleksandro Porfirjeviĉ Logvin naskiĝis en 1903 en Ukrainio (Sovetunio). Li esperantistiĝis en 1923 kaj antaŭ la dua mondmilito beletre kunlaboris ĉefe en „Heroldo de Esperanto”. Pro malpermeso de Esperanto en sia hejmlando li estis devigita silenti dum kelkaj jardekoj, sed eksciinte antaŭ kelke da jaroj ke eksterlande la internacia lingvo vivas, progresis kaj evoluis, li aktiviĝis denove.

*Animo mia en mallumo  
suferi, muti longe devis.  
Sed venis hor'! Al la forumo  
mi iras, voĉon mi ricevis.*

Oni ne povas diri ke antaŭmilito li apartenis al la fekundaj kaj konataj poetoj (Auld eĉ ne mencias lin en *Esperanta Antologio*), sed eble malnovaj esperantistoj memoros pri liaj poeziaĵoj sub la pseŭdonimo *Liljer*.

La novaperinta libreto ne kronologie prezentas liajn poemojn: inter antaŭmilitaj verkaĵoj estas prezentitaj tiuj el la lastaj jaroj. La kolekto estas ordigita laŭ diversaj ĉapitroj, inter kiuj mia opinio la lasta elstaras (interpreto de kelkaj rusaj poetoj) pro la lingvo uzita kaj ĉar Logvin metas antaŭ niaj okuloj tute ne aŭ nur supraĵe konatajn verkistojn.

Pri la propraj poemoj liaj oni povas konstati, ke ili respegulas la ofte kutiman animan batalon de persono batita de la

vivosorto kaj ne vidanta eliron: regas malĝojo, animdoloro kaj sentemo. Aliflanke li montras, ke li povas jubili okaze de gravaj eventoj, ekzemple pri la unuaj kosmonaŭtoj. Cetera ankaŭ ĉe li alternas beleco kun banaleco, poeziaj gemoj kun iuj malbelaj rimoj. Tamen entute oni povas ĝoĝi ke li reaperis sur la esperantan beletran scenejon kaj kvankam li estas ne plu junaĝa, lia plumo certe povos produkti ankoraŭ multajn belajn verkojn. La fakto ke precipe liaj lastjaraj versoj montras progreson, pravas tion.

AL STAFETO ni danku ke ĝi prezentis Logvin al la esperanta publiko, ĉar verkaro de sovetano ankoraŭ ne estis inter la multaj libroj eldonitaj.

P.S. Supra publikigo signifas mejloŝtonon por la eldonaĵo STAFETO, ĝi estas la 50-a prezentita. J. Régulo bonege daŭrigas la tradicion de la antaŭmilita „Literatura Mondo” kaj estas fakto ke li grave kaj multe kontribuas al la antaŭenigo de nia literaturo kaj sekve al la evoluo de Esperanto Sume la 50 verkoj ampleksas pli ol 10.000 (dek mil) paĝojn, dividitajn en kvar serioj: belliteratura serio (pli ol 5500 paĝoj), popularscienca serio (pli ol 400 paĝoj), serio movada (pli ol 1000 paĝoj) kaj beletraj kajeroj (pli ol 3300 paĝoj). Ni konsciu ke ni estas gratulindaj pro tia eldonisto, intertempe obstine daŭriganta kaj aperiga(o)nta diversajn pliajn gravajn verkojn.

P. M.

*JEN ESTAS HELPO POR VI. Verkita de Kristano Venkanta. Trad. en Esperanto de A. F. Doneis. Eld. de la aŭtoro, 1965. 56 p. plus kovrilo. Havebla kontraŭ du rpk. ĉe Esperanto Press, CAR-DIFF, Ontario, Kanado.*

La aŭtoro de tiu ĉi broŝuro kies pseŭdonimo estas Christian Victor (Kristano Venkanta) atestas pri sia kredo je Dio. La Biblio donas la solvon por ĉiuj niaj malfacilaĵoj. La biblio estas laŭlitere vera. Mi dubas, ĉu li konvinkos multajn eksterstarantojn. Por tio lia rezonado estas tro ligita al jam antaŭe fiksita elirpunkto.

H. G.

*NORDA PRISMO. Kultura, socia, literatura revuo, dumonata. 1965-n-ro 3.*

*Abonprezo por la tuta jaro 14.- sv. kr., 38 steloj.*

Estas ĉiam plezuro tralegi ĉi tiun elstaran Esperanto-revuon. Tre leginda: artikolo „La Kvindeka Mejlŝtono”, pri la fama Esperanto-eldonejo „STAFETO” (Tenerife, Kanariaj Insuloj), gvidita de Juan Régulo Pérez. Stafeto ĵus eldonis sian kvindekan libron. En 1952 aperis la unua eldono!

Alia grava artikolo pri moderna dana komponisto Carl Nielsen. Rekomendinda revuo. Vidu krome sub KONCIZE.

H. G.

*FREEDOM OF SPEECH. The case for Esperanto. Eld. The British Esperanto Association, 140 Holland Park Avenue, LONDON W 11, Anglujo. 14 x 21½ cm., 35 p. plus kovrilo. Broŝ. Prezo ne indikita.*

Tre bona anglalingva propagandbroŝuro por Esperanto, kun informoj pri i.a. avantaĝoj de E., karaktero de la lingvo, prononcado, organizacioj, listo da E-vortoj, k.t.p.

Ne seka pritrakto de la Internacia Lingvo, sed instige verkita kaj ilustrita broŝuro kun multaj praktikaj kaj utilaj informoj.

*LANTERNO. Sendependa Internacia Gazeto, n-ro 1, julio 1965, 1-a jarkolekto. Adr. Redakcio kaj Administracio: Infanteriestr. 12/1, 8 MUNCHEN, 12, Germanujo. Abonprezo 6 GM.*

La sesfoje en la jaro aperanta gazeto celas informadi la esperantistan publikon pri procedoj de la evoluo en la komunista bloko. En ĉi tiu unua numero i.a. artikolo pri „La Kazo Mihajlo Mihajlov”.

## NI RICEVIS:

**Informa Bulteno de Brnaj Foiroj kaj Ekspozicioj.** En Esperanto-versio eldonis Entrepreno por eksterlanda komerco, Brnaj Foiroj kaj Ekspozicioj, redakcia adreso: Vystaviútê 1, BRNO, Ĉeĥoslovakujo. 11 p.

**LEGU KAJ LERNU, n-ro 4: SUB LA ĈIELO.** Popolkantoj el diversaj landoj. Red.: Derrick P. Faux, Valley Farm House, Charnton, nr. BICESTER, Oxon., Anglujo. Prezo 1/6 p. (3 steloj).

## OMĜE AL JUAN RÉGULO PÉREZ.

*Lectio certa prodest, varia delectat<sup>1)</sup>*

En angulo, preskaŭ neperceptata eĉ de atenta leganto, sur la lastlasta paĝo de poemverko de Aleksandro Logvin\*), estas presitaj jenaj linioj:

*Ĉi tiu poemlibro estas la KVINDEKA LIBRO eldonita sub la emblemo STAFETO. Okaze de ĉi tio SALUTON AL LA LEGANTO de la eldonisto JUAN RÉGULO PÉREZ. HELPU PLU PORTI LA TORĈON!*

Jen simpla karakterize modesta informo de modestega homo! Sed kio kaŝiĝas sub tiuj simplaj vortoj? Ĉu vi povas imagi, kara leganto? Ĉu vi komprenas kion tio signifas, 50 (jes kvindek!) eldonaĵoj, 50 valoraj volumoj deponitaj de la starto en la jaro 1952? Aro da brilaj kaj elstaraj, ankaŭ da malpli imponaj verkoj, kune formanta ĉenon pri la esperanta literaturo, kiu „garantias la lingvon kontraŭ pereco”? Kiom da laborhoroj por tralegi kaj selekti manuskriptojn, por korespondi kun verkistoj, por pretigi la presadon, por korekti la provojn, por elekti la kovrilojn, por financi la tuton, por anonci, por farsendi recenzekzemplerojn, por provizi la libroservojn, por prizorgi librotenanon, por . . . ktp. ktp. Tralegu la jubilean katalogon de la unuaj 50 volumoj de STAFETO kaj miru, miregu kiom alte Juan Régulo Pérez portas la torĉon. Sed ne pensu ke la eldonado estas lia sola laboro: li estas profesoro pri romanida filologio kaj pri Esperanto en la universitato La Laguna; li estas regula kunlaboranto en la Somera Universitato de la Universalaĵ Kongresoj (lastfoje ankoraŭ en Hago); li verkas multajn prilingvajn artikolojn, eseojn kaj recenzojn.

Entute ĝisosta diligenta esperantisto, unuaranga batalanto por nia sankta afero, kiu spitante mokojn kaj enviojn suriras la vojon elektitan. Krome modesta laŭkaraktero, persista, altinstruita, jen konciza portreto de la akademiano (jes, ankaŭ labortereno lia) Juan Régulo. Al lia personeco (li ja fojfoje ornamas siajn eseojn

per latintlingva citaĵo) oni povas atribui la devizon: *nihil volentibus arduum*<sup>2)</sup>. Kosciante pri la modesteco de mia samideana amiko, mi ne daŭrigas per superlativoj, kiujn li certe ne ŝatas, kvankam meritas. Mi finu per linioj, kiujn li foje dediĉis al mi, sed kiuj pli validas por lia laborado:

„Kara amiko, daŭrigu vian trafan, dankindan, celkonscian laboron por la bono de nia afero, kaj Esperantujo certe dankos vin, se ne brue kaj formale, tamen kore kaj edukiĝe!”

Tutkorajn gratulojn! Kaj . . . kuraĝe antaŭen al la centoj!

P. M. Mabesoone.

- 1) bonkvalita literaturaĵo utilas al ni; la legado de variaj verkoj agrable okupas nin.
- 2) nenio maleblas al tiu, kiu arde volas.
- \*) Vidu por recenzo de la verko paĝon 76 de ĉi tiu numero.

### Esperanto-Kalendaroj.

Jam denove proksimiĝas la tempo, en kiu ni devas pripensi aĉeton de kalendaro por la nova jaro. Por personoj, kiuj eble volas mendi Esperanto-kalendaron, ni ankoraŭfoje mencias la al ni konatajn eldonojn.

En Svislando aperas la Svisa Esperanto-Kalendaro. Ĉiu monato estas ornamita de bildo de Svisa pejzaĝo. Eldoninto estas Karl Heinz Mischler, Franklinstrasse 29, ZURICH 50, Svislando. Prezo: sfr. 5,50, inkl. afranko.

En Germanujo aperas la Esperanto-Best-kalendaro. Ĉe ĉiu monato bildo de besto (j) kun priskribo en Esperanto kaj germana.

Eldoninto estas Reinsteg-Verlag, 7261 GECHINGEN ü. CALW, Germanujo.

La prezo estas gmk. 4,—.

Ĉi tiu kalendaro oni ankaŭ povas mendi pere de nia libroservo. La Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo eldonas Ĉinartan Esperanto-Kalendaron. Ĝi estas donaco por abonintoj de Ĉina Esperanto-Revuo Adreso de eldoninto: P. O. Kesto 313, PEKINO, Ĉinujo.

## AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

Poŝtkonto 7 6 9 1 5.

## Taskoj por la Esperanto-Ekzamenoj

1965-a.

*Ĉi-kune ni presigas la taskojn de ĉi tiu jaro por la E-diplomo. En sekvontaj numeroj ni publikigas tiujn por la M- kaj S-diplomoj.*

### ALGEMENE NEDERLANDSE ESPERANTO-EXAMEN-COMMISSIE

E 1. Amersfoort, 5 juni 1965.

Ter vertaling. Tijd: van 2-4 uur.

*Rememoroj pri la lastaj jaroj de mia patro.*

Kiel juna kuracisto mi helpadis al mia patro en lia medicina laboro. Li intencis iom post iom enkonduki min en sian kuracistan praktikon kaj tute ne supozis, ke tio okazos subite. La 22-an de novembro 1914, dum la nokto, la patrino vekis min. Terure timigita, ŝi vokis al la patro, kiu sidis sur la lito kun vizaĝo pala kiel papero. La unuan fojon en mia vivo mi aŭdis la patron ĝemi. Li suferis pro fortega doloro de koro. Mi tuj decidis telefoni al iu sperta kuracisto inter la kolegoj kaj amikoj de mia patro, sed li energie malpermesis al mi tion fari, dirante, ke li ja mem estas kuracisto, kiu scias tre bone ke la atako baldaŭ pasos. Li ne volis maltrankviligi kolegojn dum la nokto sen vera bezono. Tamen la doloro daŭris kaj mi, malgraŭ la malpermeso, venigis unu el la amikoj de la patro, doktoron Kunig, faman speciliston de kormalsanoj. Kiam li alvenis, la patro jam fartis pli bone kaj forte ripoĉis min pro mia malobeo. Tamen montriĝis, ke la stato de la koro estas tre grava kaj la patro estis devigita resti en la lito kelkajn tagojn. Mi dume anstataŭis la patron en lia kabineto por malriĉaj pacientoj, kiuj ĝis tiam grandamase vizitadis lin por peti konsilon kaj kuracon. De tiu momento mi ne plu allasis lin al tiu vere laciga matena laboro. De post tiam li havis la matenojn liberaj por labori nur por Esperanto, li akceptis siajn pacientojn nur dum du horoj posttagmeze kaj ne estis devigita sidi ĝis postnoktomezo apud sia skribtablo por fari sian laboron esperantan. Adam Zamenhof en „Pola Esperantisto”.

E 3.

*Diktaĵo.*

En la buĉista butiko.

La kliento prenas akran tranĉilon de sur la vendotablo kaj etendas ĝin al la buĉisto kun la vortoj.

„Ĝi ne multe utilos al mi, sed vi povas ĝin detranĉi, ĉar mi intencas kunpreni ĝin”.

„Kion mi detranĉu?” estas la mira respondo.

„Vian fingron. Vi pesis ĝin kun la viando kiun mi aĉetis kaj mi nepre deziras havi ĉion kion mi pagis”.

E 2.

Ter vertaling. Tijd: van 10-12 uur.

*De twee vrienden.*

1. Twee jongens, een van zeven en een van negen jaar, wandelden in een bos.
2. 't Was warm en Jan, die moe was, zei tegen zijn vriend: „Piet, zullen we een ogenblik rusten onder die grote boom? Ik kan niet meer lopen!”
3. Jan had in zijn zak twee appels, die zijn moeder hem gegeven had.
4. Hij nam de mooie appels en gaf er een van aan zijn vriend.
5. Zij begonnen te eten en na enkele minuten waren de vruchten verdwenen.
6. De beide jongens keken elkaar aan, alsof ze zeggen wilden: „Wat was die appel lekker!”
7. Toen vroeg de jongste: „Weet je wat ik doen zou, als ik rijk was?”
8. „Nu”, antwoordde Piet, „wat zou je doen?”
9. „Ik zou alle appels van de wereld kopen”.
10. „Maar ik houd ook veel van appels, Jan”.
11. „Ja, maar ik zou jou de helft geven, want jij bent mijn beste vriend”.
12. Piet begon te lachen en stond op.
13. „Nu gaan we naar huis”, zei hij, „moeder weet niet waar we zijn. Ze zal ongerust worden, als ze ons niet vindt”.
14. 't Is tijd te vertrekken; als je niet mee gaat (= komt), ga ik alleen”.
15. Jan en zijn vriend gaven elkaar de hand en zo holden ze het bos uit.
16. Piets moeder had hen niet gezocht.
17. Gelukkig stond het middageten op tafel: ze hadden honger!

## Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”

Pres.: S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, Den Haag.  
Tel.: 0 70 - 54 21 86.

Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).  
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25.  
Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuiĝo.

Libroservo: Borniastraat 95, Leeuwarden. Poŝtĝirkonto 7 69 15.

Gazetarservo: Frederikslaan 47, Schoorl (N.-H.).

Anoncoj: Anonctarifoj laŭ peto haveblaj ĉe la kasistino.

Informa Fakto: S-ino H. J. Woessink-Boet, Vondellaan 47, Arnhem.

Biblioteko: S-ro J. R. Janssen, Veen en Duin 15, Bloemendaal.  
Tel.: 0 25 00 - 5 11 20.

## KONCIZE

**Fondiĝis Instituto por Oficialigo de Esperanto.** La celo de IOE estas per kampanjo de koncentrigita kaj samtempe ĉiufanka agado krei bezonon de la lernado de Esperanto per ĝia enkonduko en ĉiujn fakojn de la homa atkiveco, kie internacia kontakto regule okazadas, kaj tiel atingi la oficialigon de la Internacia Lingvo.

Provizora sidejo: 13 rue de la Reïnette\*), BRUSELO, Belgujo. Direktoro estas Lic. Tibor Sekelj. Ĝenerala sekretario estas Antonije Sekelj, adr.: Kondina 24, BEOGRAD, Jugoslavio. Nederlanda membrino de la direkcio estas f-ino Thérèse van den Reijen.

\*) Noto de la red.: Por eviti ĉiun lingvan diskriminacion, de kiu speciale Esperanto devas deteni sin, ŝajnas al mi dezirinde en la oficiale dulingva BRUSELO ĉiam ankaŭ mencii la nederlandlingvan (flandran) stratnomon, ĉi tie: Pijppelingstraat.

### MODERNEGA PRESEJO EN ABIĜANO.

Abiĝano, ĉefurbo de Ebura Bordo, posedas unu el la unuaj ĵurnaloj de la mondo presataj tute per rotacia ofseta sistemo. La modernega presejo de „Fraternité-Matin”, ampleksa 2000 m<sup>2</sup> kaj tute klimatizita, presos ankaŭ lernolibrojn. Ĝia direktoro, Dono Fologo, estas ankaŭ stipendiito de Unesko. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

### JAPANUJO FONDIS PACKORPUSON

Antaŭnelonge la Japana Parlamento voĉdone dediĉis \$ 214 000 al la fondo de „packorpuso”, kiu konsistu el 20- ĝis 35-jaruloj ricevintaj minimume du jarojn da supera eduko kaj havantaj specialan scion pri terkulturo, arbarkulturo, fiŝkaptado, medicino, konstruado, inĝenierado, eduko aŭ etindustrio. Jam en junio la unuaj grupoj de po 5 ĝis 10 volontuloj vojaĝis al aziaj kaj afrikaj landoj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA).

**Okaze de la 60-jara datreveno** de la Unua Universala Kongreso de Esperanto (Boulogne sur Mer, 1905) ĉe Esperantaj Francaj Eldonoj aperos serio da broŝuroj „Zamenhof en sia tempo”, i.a.: La Homaranismo de D-ro L. L. Zamenhof, de Corry van Kleef.

### Gronlanda numero de Norda Primo.

La dana eksterlanda ministerio mendis 1500 ekzemplerojn el la gronlanda numero de Norda Primo (vidu ankaŭ sub TRA LA LIBRARO). Oni povas peti senpagan alsendon de tiu numero ĉe la Dana Ambasadego, Sophialaan 13, Hago.

**Radio Pekino** - Laŭ „Heroldo” la ĉina stacio dissendas ankaŭ dimanĉvespere je la samaj horo kaj ondlongoj: 21.00-21.30 (M.E.T. = Nederlanda tempo) per ondoj 30,1, 40,4 kaj 51 m (9955, 7440 kaj 5880 kHz). Tio sendube estas eraro pro la tempdiferenco, la elsendoj je tiuj horo kaj ondlongo okazas *nur* vendrede kaj sabate.

